

N°165
janvier
février
mars
2014

LA INFORMILO

N° 165
januaro
februaro
marto
2014

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

Nova Versio

Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

esperanto
France-Est



ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 15€

Por eksterlando: 18€

Reta abono: 7,50€




La 18-an de decembro 2013 okazis en la belga konsulejo de Sankt-Peterburgo memoriga vespero okaze de Zamenhof-festo. Festparoladis la belga Ĝenerala Konsulo Marie-Louise Vanherk, prezidanto de la Sankt-Peterburga Esperanto-societo "Kariljono" Svetlana Ejst kaj Profesoro de la Fakultato pri Artoj de la Sankt-Peterburga Ŝtata Universitato Jozef-Willem Haazen. Marie-Louise Vanherk estas tre simpatia kaj saĝa virino kaj tre sperta esperantistino.



En komuna foto ŝi estas en ruĝa jako; en la konsulejaj ŝtuparoj ne sufiĉis lokoj por ĉiuj partoprenantoj. Partoprenis en la programo tre talentaj junaj belaj kantistinoj kaj pianistino. Post la programo okazis tre bongusta kaj abunda festbankedo. Tiun feston partoprenis pli ol 60 personoj.

[Nova abon-ebleco en ĉi-tiu numero](#)

[Eblas ankoraŭ aliĝi al nia staĝo en Storckensohn](#)

Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Provizore por ĉi-tiu numero Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Asesseeurs	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.95.55	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	fredporretti@gmail.com
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	simone.kiry@gmail.com
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	06.34.33.68.93	mirantur@hotmail.com
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.86.42	bertrand.wick@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr

Abono al La Informilo →	Francio: 15 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est	← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY	← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1 En Sankt-Peterburgo	13 Catherine Roux	<p align="center">ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur : Pol Denis, Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par <i>l'imprimerie Sprenger</i></p>
2 Komitatoj kaj menuo	14 Fernando	
3 Internacia Festivalo	15 Abonoj kaj kotizoj 2014	
4 Internacia Festivalo	16 Distra paĝo	
5 Internacia Festivalo	17 Lingvilo	
6 Aktivaĵoj en Mulhouse	18 Kondolencoj	
7 Angulo de la prezidanto	19 Staĝo en Speyer	
8 Pri japana libro	20 Staĝo en Speyer	
9 Pri japana libro	21 Ker-ekzameno	
10 Storckensohn	22 Taĝikistano	
11 Storckensohn	23 Semajno en Issambres	
12 Grésillon	24 Fototeko	

IF INTERNACIA FESTIVALO

... jarfine al IF

La 30-a INTERNACIA FESTIVALO en NÖRDLINGEN

27. 12. 2013 - 3. 1. 2014

Kadra temo: Retrospektivo



HDP bonvenigas la partoprenantojn

Ĉi-jare la trian fojon okazis la Internacia Festivalo en la pitoreska urbeto *Nördlingen* en la bavara parto de Germanio. Ĝi estis anoncita kiel la lasta, do multaj deziris adiaŭi HDP-on (Hans-Dieter Platz) kaj venis ĝui la Festivalon. Ĉiuj estis kontentaj renkonti siajn iamajn geamikojn. La eventon partoprenis 122 esperantistoj el 22 landoj. Inter la plej malproksimaj ne mankis japanoj, israelanoj, rusoj kaj islandano. Irananoj ne povis veni pro nericevo de vizo. Por ĉiuj estis granda surprizo, kiam oni eksciis, ke la ĉi-jara IF ne estos la lasta, kiel antaŭe anoncite. La adiaŭa okazos venontjare en *Jülich*...ĉu vere?

Post la enkondukaj vortoj de la organizanto HDP estis

ofertita ŝaŭmvino pro la 30-a jubileo de la aranĝo. Mikaelo Bronŝtejn el Rusio gvidis la interkonan vesperon. Li amuzis la publikon per kelkaj skeĉoj kaj prezentis novulojn. Sekvis la kutima vespera "knajpumado", kiu donis ŝancon pli bone konatiĝi kaj amikiĝi ĉe glaso da biero, vino aŭ koktelo. Ankaŭ dum la posttagmezaj kafo-paŭzoj la "knajpo" (IF-trinkejo) estis amase frekventata.

La programo kiel ĉiam estis abunda kaj bunta. Dum la dimanĉa matineo oni omaĝis IF-partoprenantojn, kiuj forpa-



Mikaelo Bronŝtejn gvidas la interkonan vesperon



Israela dancado



sis lastatempe. Ni povis spekti filmon pri "Giganta araneo" prezentita sur DVD de Ugo de Riu. Bildserion kun rakontado pri la vojaĝo tra Islando montrante la islandan naturon prezentis Barbara Muhlemann. Pri spertoj en Nepalo dum la Himalaja renkontiĝo kaj pri regulaj someraj renkontiĝoj en Pluezeko rakontis la geedza paro el Bretonio gesinjoroj Dubois. Okazis paroliga kurso por komencantoj sub la gvido de Aĥman Junusov el Dagestano, matena gimnastikado kun Barbara Poterucha kaj vespera joko kun Arlette Plutniak. Japanan



Israela Novjariĝo

arton - origamio - instruis Larysa Osadchuk kun Anastasia Jemakova el Ukrainio. De Anna Striganova oni aŭskultis pri fabelaj mondoj, Dima Ŝevĉenko parolis pri libroeldonoj de la

rusa eldonejo Impeto, Mikaelo Bronŝtejn rakontis pri spertoj dum siaj vojaĝoj al IF kaj dum la aŭtora horo li prezentis siajn verkojn, kiujn oni povis



aĉeti. Kun Ljuba Malezh okazis "Posidelki" - teotrinkado kaj gustumado de dolĉaĵoj. Komputilado ĉiam pli kaj pli disvastiĝas ankaŭ en nia medio. Pluraj komputilis dum la evento. Okazis kelkaj vizitoj al la urbo, promenoj sur la urba murego, supreniro al la turo *Daniel* kaj vizito de *Rieskrater* muzeo.



Fotemuloj por la polonezo

Jam la sepan fojon efektiviĝis IVU-prelegoj: pri "Krateroj, Asteroidoj, Meteoritoj" parolis Larue Bernard-Régis, pri "Aŭroro - la nordia lumo" - Amri Wandel, la "Novparolon - Retrospektive" klarigis Ian Fantom, pri "Ĵurnalismo en Turkio" donis informojn Thomas



Tuttaga ekskurso al *Rothenburg*

Bormann. La prelegon “Slovakio: modela EU-lando en interreta multlingva lingvo-instruado” prezentis Jozef Reinvar, vic-ambasadoro de Slovakio.

Aliaj prelegoj temis pri: diversaj kongresoj en Israelo, pri grimpadon sur Akonkagvo laŭ la spuroj de Tibor Sekelj kaj pri Esperanto-informado en la interreta epoko. Ĉion tion prezentis Amri Wandel. Tatjana Loskutova rakontis pri tri vizititaj landoj (Albanio, Serbio kaj Moldavio), kie ŝi prelegis pri Esperanto. Faktorojn de aĝiĝo klarigis Harald Schicke, preventon de ostoporozo Frank Nietzsche. “Kunlaboro kun la

redakcioj el vidpunkto de la ĵurnalisto” estis temo de Alfred Schubert. Stefan MacGill parolis pri “Novaj ventoj ĉe UEA”.

Ne mankis kutima antaŭsilvestra programo “IF en retrospektivo”. Dum ĝi Brian Moon prezentis bildojn el la pasintjara IF en Dortmund. Oni povis rigardi fotoalbumojn el pasintaj IF-oj kaj interesajn trukfotografiojn de Klaus-Dieter Albrecht. Diskutrodon pri politiko animis Bert Schumann. Ian Fantom ludis pianon, tabloludojn iniciatis Nora Caragea. Libroservon prizorgis Alain Delmotte. Kelkfoje eblis ĝui endoman saŭnon.



Nataša Bertse gitarludas kaj kantas

La tradicia Silvestra vespero komenciĝis per festa kaj luksa bankedo. Sekvis balo inaŭgurita per polonezo sub la gvido de Barbara Muhlemann kaj jam kutima plurfoja festado de novjaroj... Vesperaj programeroj inkluzivis Jubilean programon, Operan kabaredon, Esperantan dancvesperon, Rusan bardan kulturon, koncerton de Nataša Bertse. Estis prezentita pup-teatraĵo “NukSORompilo”. Dum la internacia vespero ni ĝuis buntan programon, al kies bona sukceso kontribuis la partoprenantoj mem. Ni aŭskultis kantojn, gitar- kaj pian-ludadon, skeĉojn, poemon. Ni spektis israelajn kaj bretonajn dancojn. La ludadon de la korea instrumento *jang-gu* prezentis en nacia kostumo Song Jeon-ok. Al ekzamenintoj estis transdonitaj IVU-atestoj.


La tuttaga ekskurso gvidis nin al la bavara urbo *Rothenburg ob der Tauber*. Post agrabla promeno tra la mezepoka urbo ni bonguste kaj abunde tagmanĝis en restoracio *Ratsstube*. Poste ni povis ankoraŭ individue promeni. Ĉiuj ĝuis la etoson de la Internacia Festivalo. Por plura estis ĝojiga afero konstati, ke IF-oj ne finiĝis. Koran dankon al la ĉefa organizanto Hans-Dieter Platz, kiu dum 30 jaroj faris grandan laboron por la bono de ni ĉiuj. Do, tiuj, kiuj ne havis eblecon adiaŭi lin povas tion fari ĉi-jarfine en *Jülich*. Venu ĝui neforgeseblajn jarfinajn tagojn kaj bonvenigi la Nov-jaron 2015!



Liba Gabalda

Fotoj Andreo

ANKORAŬ UNU PLIA IF
2014 ▶ jarfine al
Jülich / Germanio



MULHOUSE ESPERANTO kaj ties aktivaĵoj

En Illzach: Bédéciné kaj en Ungersheim: Foiro pri "Ekologio kaj justa komercado"

En la semajnfino de la 16a kaj 17a de novembro 2013, nia grupo sukcesis partopreni en ambaŭ okazaĵoj, nome en Illzach, kie okazis Bédéciné kaj en Ungersheim ĉe foiro pri Ekologio kaj Justa Komercado.

Dank'al la bonvolemo de pluraj el niaj membroj, ni sukcesis organizi samtempan deĵoradon por tiuj tagoj en ambaŭ lokoj. En Illzach ĉe Bédéciné ni povis proponi bildrakontojn, kaj vendi ilin eĉ al ne-esperantistoj. Tamen plej ŝatata estas Tinĉjo.



Dejoras Bertrand en Illzach



Robert en Ungersheim

En Ungersheim deĵoris alterne Roberto, Edmond, Simone kaj Andreo kiuj provis kapti la atenton de la publiko per iom da instruado de la lingvo.

Zamenhof-festo en Mulhouse la 14an de decembro 2013



Laŭ-vice niaj Zamenhof-festoj okazas en la tri landlimaj regionoj, Svislando, Germanio, Francio. Ĉi-jare la grupo de Mulhouse transprenis la organizadon. Nur de 2 jaroj funkcias rekta trajno de Frajburgo al Mulhouse. Jacques deziris elprofiti tion kaj proponis komenci la tagon jam en la mateno por akcepti la gastojn en la stacidomo.

Post promenada vizito tra la urbo, la grupo atingis la "Domon de Libera Tempo", kie Andreo regule instruas pri komputilo. Tie okazis la tagmanĝo en amika etoso.

En la apuda salono disvolviĝis la cetero de la programo. Jacques interese klarigis pri la historio de la urbo Mulhouse.

Edmond voĉlegis al la publiko poemojn de Gérard Leser en la alzaca dialekto kaj la tradukon al Esperanto. Juna brazilano Diego klarigis pri la eblecoj partopreni Internacian Junuaran Kongreson. En la komputila salono eblis spekti la unuhoran filmon pri Esperanto, proponitan de SAT. La posttagmezo finiĝis per kafumo kun diversaj bongustaj kukoj preparitaj de membroj.

Tri-reĝa festo en Espace 110

La jaro 2014 komenciĝis per nia tri-reĝa festo la 10an de januaro. Venis kelkaj membroj el nia asocio, lernantoj de nia kurso.

Pluraj boteloj estis metitaj sur la tablon. Alzaca vino, ŝaŭmvino, cidro kaj suko. Nia asocio prizorgis la migdalo-tortojn, 4 entute. Tamen ĉe la fino ekestis nur 2-gereĝoj.



Verdaj Fadenoj en Mulhouse kaj Saint-Louis

Verdaj fadenoj estas la nomo de niaj monataj lundaj kunvenoj. Ili okazas alterne en restoracio en Mulhouse kaj Saint-Louis por babili en Esperanto, kaj por ĝui la lingvon.

Gaja kaj amika etoso allogas la partoprenantojn. Ĉi-tie en Saint-Louis la 27an de januaro 2014

Fotoj kaj raportoj de Andreo

Karaj gesamideanoj !

Dank'al nia laborema kaj kreema samideano André GROSSMANN vi jam ĝuis la legadon de LA INFORMILO 164 ankoraŭ ekproduktita de nia kara Pol DENIS.

Nun kuŝas sur via tablo la numero 165, kiu denove atingis vin dank'al la klopodoj de André. Pri ĝi necesas doni kelkajn klarigojn.

Pluraj samideanoj pretus ne plu ricevi paperan version de LA INFORMILO. Krome ni ne plu povos garantii – almenaŭ dum la unuaj provoj de la novaj numeroj – la saman paĝnombron.

Pro tio, ke ni ne plu kapablas garantii regulan aper-ritmon, ni ankaŭ ne plu petis la favorajn prezojn de la poŝtaj servoj, kiuj estis akireblaj pli kaj pli malfacile.

Vi eble ankaŭ ne sciis, ke ni estas devigataj sendi dekon da paperaj ekzempleroj al la prefektejo kaj al aliaj oficialaj instancoj. Tion ni plufaros. Ni ankaŭ plusendos paperan ekzempleron al la kutimaj gravaj bibliotekoj priesperantaj kaj al aliaj, sed ni ne plu sendos LA INFORMILO por interŝanĝo de revuoj, krom eventuale per la reto. Same ni ne plu sisteme havigos ilin al la lokaj gazetoj.

Tamen ni informos la ĝisnunajn ricevintojn, ke ili povos ricevi elektronikan version en pdf-formato.

Vi mem elektu por la venonta jaro kaj laŭ la tarifoj, kiujn ni anoncos, surparan aŭ surekranan legadon de LA INFORMILO.

Kaj ne forgesu : interesas nin kaj niajn gelegantojn la informoj pri via propra agado kaj la agado de via grupo.

Edmond LUDWIG

Karaj gesamideanoj !

En la financa raporto sendata al niaj membroj evidentiĝas, ke en 2013 la eldonado de 4 tut-koloraj numeroj draste altiĝis kompare kun 2012. Eble nia bulteno estas tro luksa por abono je 15 eŭroj. Diskutante kun la loka presito, mi eksciis, ke koloraj paĝoj estas 4-oble pli kostaj ol nigre-blankaj. Tial por eviti altigon de la kotizo por 2014, mi proponas, ke nur duono de numero estu kolora, la ceteraj paĝoj, kiuj ofte estas sen fotoj, povas esti nigre-blankaj. Ĉi-tiu numero estas jam presita laŭ tiu principo.

Krome vi trovos sur la kotiz-tabelo la abon-eblecon al reta versio je 7,50 eŭroj anstataŭ 15 eŭroj. Se vi jam pagis vian abonon je 15 eŭroj, eblas tion transformi al 2-jara ret-abono.

Mi pretas pluvivigi nian bultenon La Informilo, sed tio ankaŭ dependas de viaj utilaj kaj akurataj kontribuoj.

André Grossmann



Vous propose son cours par correspondance:
Pour vous initier à la seule vraie langue internationale
Pour vous perfectionner et trouver plaisir à converser en
espéranto!


Pour profiter de nos stages, de nos rencontres, de nos congrès, de nos voyages.

La soluton: Un cours personnalisé chez soi!

Notre cours par correspondance: rapidité, efficacité

Edmond LUDWIG
26, route de la Schlucht
68140 STOSSWIHR
Tél. 03 89 77 52 56
esperanto.eludwig@orange.fr
<http://esperanto.alsacelorraine.perso.ne>

- ♥ un matériel adapté
- ♥ une technique éprouvée
- ♥ un réseau d'animateur performant
- ♥ un savoir immédiatement opérationnel



"Rememoroj pri Tempo de Silko kaj Pajlo"

Estas kolekto de tre interesaj rakontoj pri malnova Japanio, inter la fino de la 19a jarcento kaj la nuna moderna Japanio

La libro estas tre bele ilustrita de Susumu Saga kaj tradukita de Judyta Szczerbicka Yamato: Afrankite 26 eŭroj ĉe la kasisto

Catherine ROUX kun la helpo de Ginette MARTIN tradukis unu paragrafon al la franca lingvo.

Le prodigue.

Masujiro Tsukado (1906-1996).

Dans le quartier de Nakajura, dans une petite ruelle derrière le grand magasin Daikoto, se trouvaient quelques bordels, des maisons de geishas et un restaurant. Quand j'étais jeune, lors d'une saison de récolte de cocons de vers à soie, j'ai dépensé dans un bordel de Nakajura, et jusqu'au dernier sên, tout l'argent gagné pendant le séchage des cocons pour Toyoshimaya.

Cependant il faut que je vous décrive d'abord le procédé du séchage.

Pendant une grande partie de l'année, Toyoshimaya servait simplement de grand magasin et, pendant la récolte des cocons, ce magasin se transformait en marché. Les stands de vente étaient déménagés et toute la construction vidée; au milieu on installait une table en bois pour la vente aux enchères, grande environ comme dix tatamis. On étalait dessus les cocons apportés par les paysans et destinés à la vente. Les Debout autour de la table, les commerçants évaluaient et choisissaient les cocons qu'ils avaient l'intention d'acheter. La vente aux enchères elle-même se déroulait ainsi: lorsqu'une partie des cocons étaient étalée sur la table, les commerçants intéressés écrivaient les prix qu'ils proposaient sur de petites tablettes spéciales (de la grosseur d'une petite tasse de riz) et ils les lançaient à un homme nommé "crieur", qui lisait à haute voix les offres: " Monsieur Yamamoto: 15 sêns, Monsieur Nataro: 20 sêns. . . . ". Les

cocons étaient vendus lorsque leur propriétaire criait "Accepté!" au commerçant qui proposait le prix le plus élevé.

Les cocons achetés étaient alors poussés à l'aide de longs bâtons depuis la table vers de grandes corbeilles. Celles-ci étaient emportées et installées sur un tapis roulant qui les faisait monter vers un séchoir. Dans la dernière corbeille on mettait un petit papier, sur lequel était inscrit le nom de l'acheteur.

Dans le séchoir, les cocons étaient jetés dans un filet, qui se déplaçait lentement le long d'une perche pendue d'un côté à l'autre du séchoir. En différents endroits du filet se trouvaient des trous, à travers lesquels on pouvait enfiler la main pour contrôler l'état des cocons. C'était le travail d'un spécialiste, on devait prendre doucement le cocon dans la main, faire une petite fente et regarder la chenille à l'intérieur. Si les cocons ne séchaient pas assez vite, on devait aller à la chaudronnerie et demander un renforcement du feu.

Au bout d'environ quatre heures, une partie du travail était terminée. Si au bout de ce temps, les cocons n'avaient pas séché correctement, par la suite ils pourrissaient ou donnaient une soie de mauvaise

qualité, c'est pourquoi nous devons faire très attention. Ensuite les cocons étaient mis dans des sacs et stockés avant l'envoi à la filature.

Peut-être le savez-vous, certains commerçants avaient le droit d'emprunter de l'argent contre la caution du stock de cocons en magasin. Par exemple, si la filature d'Okatani achetait 500 kans, mais qu'il s'avérait qu'elle n'avait pas assez d'argent pour payer comptant, elle pouvait se tourner vers la banque avec une demande d'emprunt selon la valeur des cocons en magasin. Si le commerçant était fiable, il recevait habituellement l'argent; si toutefois il y avait eu un jour des problèmes avec lui, la banque ne lui avançait pas d'argent, même pour une journée. C'est pourquoi, si le commerçant avait perdu son crédit en banque, il était presque assuré d'une banqueroute.

Pendant quarante jours, j'ai travaillé sans arrêt au séchage des cocons et à la mi-juin, j'ai fini le travail avec 50 yens en poche. Pour la première fois de ma vie je suis devenu propriétaire d'un billet de dix yens, et dix yens à cette époque-là valaient autant que cent yens aujourd'hui. Donc je dois dire que 50 yens me paraissaient une fortune comme je n'en avais jamais vu de mes yeux.

Dès que j'ai eu cet argent, je suis allé immédiatement à Toyonoya, un petit bordel qui se trouvait juste derrière chez Toyoshima. J'y ai habité en juin et août, jusqu'à la nouvelle saison des cocons de vers à soie au début de septembre.

Pour une nuit dans un bordel, à cette époque-là, on payait 50 sêns. La femme avec laquelle je passais tout mon temps s'appelait Okiku. Pour dire la vérité, elle n'était pas jeune; d'après mes calculs, elle avait probablement vingt ans de plus que moi. Si je me souviens bien, elle n'était pas non plus particulièrement belle.

Dans le bordel vivaient des filles plus jeunes. Du fait que peu d'hommes fréquentaient cet endroit avec 50 yens en poche et l'intention d'y rester quelques mois, j'ai été traité comme un roi. Les filles avaient une vie difficile; pour ne pas avoir de problèmes, elles devaient se trouver un client chaque nuit. Si à 9 heures personne n'était venu pour choisir une fille, celle-ci devait aller dans la rue et persuader n'importe quel passant de la suivre. Elle devait y stationner debout jusqu'à minuit ou même plus. On peut s'imaginer comme c'était difficile en hiver. Elles étaient habillées seulement de légers kimonos, donc elles se gelaient jusqu'aux os. C'était si désolant qu'elles essayaient alors d'attraper même un ivrogne et ne le lâchaient pas tant qu'il n'avait pas refusé d'entrer. Une fois même, il s'est trouvé qu'une fille a arrêté un couple - une femme conduisait son mari malade chez le médecin - et la

femme a dû se battre contre un groupe de filles pour qu'elles n'entraînent pas le mari à l'intérieur. Ce n'était pas une plaisanterie.

Lorsqu'une fille avait pu trouver un client, le propriétaire du bordel retenait soixante-dix pour cent de la somme et elle touchait un reste misérable. En raison de cela, même si elle travaillait toute la nuit, elle ne gagnait pas plus de 15 sêns, c'était une façon rudement pénible de gagner sa vie. Du fait que j'étais là chaque nuit, Okiku n'avait pas besoin de chercher d'autres clients. Nous nous conduisions comme un couple; si je sortais pendant la journée, au retour je lui apportais souvent des gâteaux de riz "o-dango". On me servait à part la nourriture, sur de beaux plats laqués, je me sentais millionnaire.

Le bordel "Toyonaya" était meublé et avait l'allure d'une maison ordinaire, mais en comparaison avec d'autres endroits semblables à Nakajura, il était d'une classe supérieure; il avait un propre portail et un jardin.

A cette époque, dans aucun bordel de ce quartier,

on n'exigeait que les filles restent assises, le visage contre une porte ajourée, afin que les clients puissent les voir. Cette coutume a été adoptée lorsque tout le quartier des bordels a été déménagé à Sakae-chio.

Les hommes qui, à cette époque-là, passaient la nuit avec les prostituées étaient surtout des ouvriers saisonniers et journaliers, ou - dans le meilleur des cas - des employés, de ceux qui aimaient s'amuser à n'importe quel prix.

Et les femmes pouvaient à peine vivre de cette profession. Mais elles avaient beaucoup de choses en commun avec leurs clients, car les ouvriers aussi étaient pauvres. On peut même dire qu'il existait une sorte de solidarité entre eux.

Traduit par Catherine ROUX, avec l'aide de Ginette MARTIN.

Les paroles d'Andreo Cseh*

En 1935, Andreo Cseh (prêtre catholique roumain d'origine hongroise et inventeur de la méthode directe d'enseignement de l'espéranto) était déjà une personne connue aux Pays-Bas. Pendant son séjour de six ans, il avait réalisé plusieurs projets dans le domaine de l'Espéranto.

En 1930, avait eu lieu à La Haye la fondation de l'Institut Cseh International, qui devint le " foyer" de l'Espérantisme.

Deux années plus tard, Cseh avait commencé à rédiger "La Praktiko" (La pratique), ce "journal facile pour débutants qui pouvait servir de modèle".

En collaboration avec le maire local, il installa à Arnhem un "lieu de conférences " espérantiste, qui fut nommé la Maison de l'Espéranto. Et grâce à ses cours il fit d'innombrables nouveaux adeptes de Zamenhof.

En même temps et grâce à l'aide d' une espérantophone néerlandaise, Julia Isbrucker, il fut capable d'attirer et de faire adhérer de nombreuses personnalités au Mouvement. Parmi eux le sénateur W. Dees, qui fut ensuite Premier ministre des Pays-Bas, E. Wensik, qui devint directeur chez Philips, M. Damme, le directeur général des P. T. T. , De Monchy, le maire de La Haye, etc. . .

En raison de ces succès, la rédaction du "Haagse Post " invita Cseh à collaborer au journal.

Tous les samedis, il devait rédiger une colonne en espéranto, qu'il nommait lui-même une "colonne de monument ", sur des thèmes d' "interlinguistique". Qu'on ne sous-estime pas ces contributions! Le "Haagse Post" était, et est resté jusqu'en 1990, un des principaux hebdomadaires, lu par un public influent dans tous les Pays-Bas.

Cseh avait comme but de recruter, grâce à son travail, des adeptes parmi des abonnés non-espérantistes.

Dans ce but il écrivait dans une langue très facile. Souvent les mêmes mots se répétaient pesamment dans une même colonne. C'était voulu, car selon la belle règle pédagogique, de nouveaux termes pouvaient ainsi entrer dans la tête des élèves.

En outre, un résultat supplémentaire en découla: Les articles devinrent de plus en plus sérieux et rehaussèrent le prestige de l'Espéranto aux Pays-Bas. De nombreuses personnes restaient en effet sceptiques, considérant l'espéranto comme un idéal pour gens simples.



En outre, Cseh considérait lui-même cette mise sur papier comme une chronique qui serait utilisée un jour par un historien.

Et il a eu raison. Nous les lisons surtout pour connaître plus profondément l'état du mouvement Espérantiste dans les années vingt et trente.

Texte: Vivo de Andreo CSEH (Ed BORSBOOM)


Traduction: Catherine ROUX

* Prêtre catholique roumain d'origine hongroise et inventeur de la méthode directe d'enseignement de l'espéranto.

Organizita de MULHOUSE  ESPERANTO En amikaj rilatoj kun BAVELO	75a printempa staĝo de  <i>France-Est</i>
Okazos la 4 / 5 / 6-ajn de aprilo 2014 En la Feriejo Le Torrent 4, rue de Mollau, 68470 STORCKENSOHN	



Ĉi-tiu ferio-komplekso situas meze de altaj Vogezoj, ĉe rando de arbaroj en mirinda sep-hektara parko. Ĝi troviĝas survoje inter Thann kaj Bussang. Apartaj duŝejo kaj necesejo por 2 ĉambroj.



KURSOJ

A: Komencantoj (débutants)

Cours pour débutants par Ginette Martin. Elle apportera le matériel adéquat.

B: Kurso por progresantoj

Gvidas Roberto Kueny

C: Progresintoj:

Paroliga kurso tute en Esperanto. Gvidas Edmond Ludwig

D: Seminario:

Prelegas Hannes Larsson

Sabate posttagmeze:

La violono. Tio inkluzivas ĉion: historio, violonfarado, ludtekniko, komponaĵoj kaj violonistoj.

Dimanĉe matene:

Spertoj de novaj esperantistoj
 La etoso de la prelego estas humura. Esperanto estas ja universala lingvo, sed necesas alkutimiĝi al la akĉentoj de la hispanoj, britoj, rusoj, japanoj kaj (por eksterlandanoj) la francoj.

Distra vespero

Kantos Mélanie PRIN
 Jen nova juna talento ! Ŝi kantas en pluraj lingvoj, inter aliaj en Esperanto. Talento malkovrita dank'al
<http://pola-retradio.org/>

Atingeblecoj:

Plej proksima stacidomo de la staĝejo troviĝas je 3 km en **Wesserling**. Inter **Mulhouse** kaj **Wesserling** veturas pluraj regulaj trajnoj kaj aŭtobusoj en la tago. Ni povos sendi al vi la diversajn horarojn inter tiuj du stacidomoj kaj laŭ peto ni veturigos vin de la stacidomo de Wesserling al la staĝejo.

estas la muziko, la matematiko, la skikurado (li partoprenas plurajn popularajn longdistancajn skikuradkonkursojn en pluraj landoj kaj skikuradas pli ol 1500 km ĉiujare), kaj de kelkaj jaroj Esperanto.

Prelegoj de Hannes Larsson



Hannes Larsson naskiĝis en Nokia, Finnlando en 1931. Li diplomiĝis ĉe la Teknika Universitato de Helsinko. Sian karieron kiel inĝeniero li faris en Finnlando, Francio, Italio kaj Belgio. Hannes specialiĝis pri la rezisto de strukturoj

kaj materialoj kaj laboris inter alie en du kampoj de pinta teknologio : la spaco (strukturoj kaj kontrolo de temperaturo de satelitoj) kaj la problemoj de nukleaj reaktoroj. Liaj ŝatokupoj

Provizora Programo:

Vendrede 4-an de aprilo 2014

- 17a Akcepto de la unuaj alvenantoj
- 17a30 eblas libere viziti
- 19a30 Vespermanĝo
- 20a30 Prezento de diapozitivoj
- 21a30 Malfermo de la knajpo.

Sabate 5-an de aprilo 2014

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30 Vizito al milita tombejo Vieil Armand aŭ Hartmannswillerkopf
- 12a Reveno al la staĝejo
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de la alvenantoj

- 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la libroservo
- 14a30/18a Kursoj A, C, kaj E.
- 18a30/19a Deklamado fare de Roberto
- 19a30 Vespermanĝo
- 20a30 Distra vespero
- Poste la knajpo estas malfermita

Dimanĉe 6-an de aprilo 2014

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30/12a Kursoj A, C, kaj E
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30 Komitat-kunsideto
- 14a Turismado
- Poste: disiĝo



Aktualigitaj informoj kaj aliĝilo aperas en nia retejo:
<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

Aliĝilo 75a Regiona Staĝo de Esperanto en Storckensohn la 4-6ajn de aprilo 2014

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Aĝo, malpli ol 18 aŭ studento	Aliĝ- kotizo	Elektita kurso
1		ĉef-aliĝanto			
2		kun-aliĝantoj			
3					
4					

Adreso

Mi preferas, ke mia adreso ne aperu en la dokumentoj disdonataj dum la staĝo (signu) Mi preferas vegetaran manĝon (signu)

Telefono:

Ret-adreso:

Mi pagas (minimуме la aliĝkotizon) jenan sumon:

per ĉeko per ĝiro al Yves STUTZ per internacia ĝiro al nia peranto en Germanio

Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.

Nombro da manĝoj kaj da tranokta- doj	Vendrede	Sabate	Dimanĉe
Tagmanĝo			
Vespermanĝo			
Tranoktado : nombro da personoj			
Ĉambro:	1-lita (kun suplemento)	2-lita	3-lita
Prefero kaj nombro da personoj			

Eksterlandaj partoprenantoj
ricevos senpage nian bulte-
non **La Informilo** dum unu
jaro.



La aliĝ-kotizo entenas la par-
toprenon al elektita kurso aŭ
prelego kaj al la distra vespero.

**Bonvolu sendi la aliĝilon kaj
vian antaŭpagon al :**

Yves Stutz,
45A, Avenue Charles de
Gaulle
68700 Cernay

**Ĉekoj je la nomo de: Yves Stutz
Internaciaj ĝiroj al: Yves Stutz
IBAN:**

FR7610278035100001386770771

BIC: CMCIFR2A

Por Germanio al nia peranto:

je la nomo de: Hans-Dieter Platz.
(menciu la celon de via pago)

Poŝtĝirokonto:

918 56-676 (BLZ 545 100 67)

PGA Ludwigshafen

Pliaj informoj ĉe:

ystutz@voila.fr

Tel. 06.38.63.20.79

ALIĜOJ	
Ĉef-aliĝanto	25 €
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)	20 €
Aliĝo por infanoj kaj gestudentoj	4 €

Restado-kostoj	
Duon-pensio: (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 1 manĝo)	40 €
Kompleta pensio (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 2 manĝoj)	47 €
Suplemento por individua ĉambro	9 €
Apartaj manĝoj	16,50 €

Programo 2014 de la franca Esperanto-kastelo Grezillon

2014-apr-19/26: FRINGOJ, renkonto inter grupoj de esperanto-lernantoj kaj iliaj instruistoj.

2014-apr-26/maj-04: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj en 3 niveloj, internaciaj KER-ekzamenoj B1-C1.

Rete: gresillon.org/printempo

2014-maj-08/11: Kantado de korusaro Interkant'

2014-maj-11/17: Renkonto de rememoroj inter malnovaj esp-istoj kaj iamaj gastoj de Grezillon. Rete:

gresillon.org/s1

2014-jun-29/jul-06: Turisma semajno, tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro kaj rezidejoj de renesancaj artistoj. Rete: gresillon.org/s2

2014-aŭg-01/09: Sennacieca semajno kun kursoj, ekskursoj kaj prelegoj, antaŭ SAT-kongreso. Rete:

gresillon.org/s3

2014-aŭg-09/17: Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, SAT-Infankongreseto. Rete:

gresillon.org/s4

2014-okt-24/nov-01: AUTUNE, la komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj.

Adreso: MCE, Grésillon, St. Martin d'Arce, 49150 BAUGE-EN-ANJOU, France

Telefono: 02.41.89.10.34

Retpoŝto: kastelo@gresillon.org

Retejo: gresillon.org

Esperanto-radioreklamo – 1002 foje, en 26 radiostacioj

Inter 1-14. de februaro 1002-foje aŭdiĝis 11-sekunda radioreklamo pri Esperanto en programoj de 26 radiostacioj en Hungario!

La suma elsendotempo (1002 * 11 sek) estas 183 minutoj, kiu signifas do iom pli ol 3 horojn...

Elektadon de radiostacioj ni faris tiel, ke ili atingu tiujn homojn, kiuj vivas ekster Budapeŝto, ĉefe en malgrandaj urbetoj, kaj eble malmulte interretumas, sed interesiĝas pri la socia, komunuma vivo de sia urbetoj.

La reklamo pri Esperanto estas aŭskultebla kiel la dua materialo en la suba reklambloko:

<http://www.esperanto.hu/zip/radioreklam-blokk.mp3>

Traduko de la reklama teksto estas la sekva:

"Por havi lingvoekzamenon, aŭ por via universitata akcepta ekzameno plej rapide oni povas lerni la lingvon Esperanto. Elprovu la interretan kurson! -- www.esperanto.hu -- esperanto.hu!"

La reklamon realigis nia "**Esperanto-Centro Eventoj**", kiu fakte estas kunlabora forumo de kelkaj E-formacioj: Fondaĵo "Eszperantó Alapítvány", societo "Eventoj" (*alinome Kultura Esperanto-Asocio*), kaj mia entrepreno "Lingvo-Studio", L.S. – kiu ĝuste nun en februaro festas sian 30-an naskiĝdaton (fondita en 1984).

Laŭ nia scio tiom longa, kaj tiom ampleksa radia reklamkampanjo por Esperanto ankoraŭ ne okazis en Hungario, kaj ankaŭ ne en internacia Esperantujo - do ni estas nun iom fieraj :-)

Antaŭ kelkaj jaroj la konata japana esperantisto-mecenato Etsuo Miyoshi subvenciis aperigon de tutpaĝaj Esperanto-reklamoj en kelkaj grandaj eŭropaj gazetoj. Nia ĵusa radioreklamo multe diferencas de tiu modelo: unuflanke nia kampanjo estas multe pli malgranda, duaflanke pro la kresko de la kvanto de la kursaj aliĝoj la kosto de la reklamado revenis ene de kelkaj tagoj...

Eble ne estas vaste konate, ekde 2003 (do jam de 11 jaroj) ni funkciigas propran, unikan, **pagan (!) interretan kurson** por hungaroj. NE TEMAS pri la Lernu-kurso, ni mem konstruis propran kurso-sistemon de nulo ĝis B2, sen financado fare de ESF aŭ de alia asocio...

Malgraŭ tio ke ĝi estas paga kurso, malgraŭ la paralela konkurenco de la senpaga Lernu-eblo, ĝis nun aliĝis pli ol **4000 (!) hungaroj al nia interaktiva reta kurso, inter ili pluraj el la nunaj aktivuloj de la internacia Esperanto-movado (aktivuloj ĉe Muzaiko, Tejo-Tutmonde, Biblioteko OIK-Fajsz, skoltoj-hu, ktp.)**

Vi certe memoras pri Catherine ROUX, kiu ankaŭ iam modele oficis en nia asocio kiel sekretario. Malfacilaĵoj prisanaĵ kaj aliaj malfaciligis ŝian vivon. Jen la teksto, kiun ŝi sendis al ni.

Kiam mi alvenis en Verduno en 2008, mi loĝis en eta apartamento strato Rue Schleiter en Verduno.

En tiu ĉi strato troviĝas "Domo St-Paŭlo" por katolikaj fideluloj.

Mi petis rendevuon kun la pastro Guy Lescanne por diskuti pri mia financa situacio kaj la suferoj de handikapuloj.

Li tuj informis Soeur Marie-Cécile, respondeculino de "Filles de la Charité" en Verduno, kun kiu mi babilis okaze de merkredaj posttagmezoj en "katolika helpo".

Kun pastro Yves Halbin, mi estis bonege preparita al baptifesto, kiu okazis la 3-an de julio 2011 kun vera teamo de katolikaj pastroj.

Mi lernis studi religion kun li kaj pastro Guy Lescanne, okaze de plurfojaj religiaj pilgrimoj en Benoîte-Vaux, komence de septembro.

Mi ankaŭ tiel konatiĝis kun la episkopo Maupu, respondeculo de religiaj aferoj en Verduno.

Pilgrimo al Benoîte-Vaux estas la komenco de "vojoj al Compostelle"; oni preĝas ĉiutage, kun speciala dediĉo al la Sankta Virgulino.

Estis grava evento por mi, ĉar mi konis neniun en Verduno.

Mia tutorino aligis min al la novjaraj festoj de "katolika helpo" en 2008; tiel mi konatiĝis kun mia baptopatrino Christine Schnitzler kaj ĉefe, kun mia koramiko Patrick Harelle, ankaŭ surda kiel mi.

Estis granda festo por mi en 2011, ĉiuj el Verduno estis apud mi.

Tiel mi povis partopreni diskut-rondojn pri Evangelio de Sankta Luko kaj pri la preĝo "Simbolo de Niceo = Grupo Credo".

Mi ŝatis ofte pilgrimi en Benoîte-Vaux kun mia baptopatrino kaj Patrick, okaze de fakaj kunvenoj aŭ diservoj.

Speciala "neuvaine" (naŭtaga preĝtempo) disvolviĝas ĉiun unuan septembran semajnon en Benoîte-Vaux: tio estas grava tradicio en Mozo, eĉ laikuloj povas partopreni ĝin.

Mi ŝatus organizi esperantistan baptifeston por la venonta jaro, sed ne scias, ĉu eblas fari tion.

Catherine

Humoraĵo

Laboristo devas transporti ŝtonojn per puŝ-ĉareto, sed la puŝ-ĉareto malbone funkcias. Kiam la laboristo uzas ĝin, ĝi faras:kviik.....kviik.....kviik.....kviik....

La laboristo iras al la sub-ĉefo por plendi:

- Mi ne povas labori per tiu ĉi aĉa materialo; kiam mi uzas la puŝ-ĉareton, ĝi faras :

....kviik.....kviik.....kviik.....kviik....

- Ĝi bezonas oleon, respondis la sub-ĉefo, iru labori, mi zorgos pri la oleo.

Unu monaton poste, la oleo ankoraŭ ne venis kaj la puŝ-ĉareto daŭre faris:

....kviik.....kviik.....kviik.....kviik....

- Mi iros al la direktoro, diris la laboristo.

Li iris kaj denove plendis ĉe la direktoro:

- Mi laboras per malbona puŝ-ĉareto, la subĉefo promesis doni oleon, sed neniam alportis ĝin kaj mia puŝ-ĉareto daŭre faras:kviik.....kviik.....kviik.....kviik....

Mi ne povas labori en tiaj mizeraj kondiĉoj !

- Mi bedaŭras, diris la direktoro, sed mi maldungas vin.

- Vi ne povas maldungi min, mi havas kvar infanojn, mi bezonas vivteni la familion, kompatu min !

- Mi tucerte maldungos vin. Rediru al mi, kiun bruon faras la puŝ-ĉareto.

-kviik.....kviik.....kviik.....kviik....

- Mi konfirmas, ke mi maldungas vin. Se vi estus bona laboristo, la puŝ-ĉareto devus fari :

kvikvikvikvikvikvikvikvik....

L'Espéranto, cette espérance


Haut-Rhin (68) Fernando Kinkani N'Kanú, en équipe ACO sur Colmar, nous parle de cette langue internationale qu'il œuvre à mieux faire connaître.

Né en Angola, j'ai aujourd'hui 58 ans, je suis marié et père de 6 enfants. Avant, j'étais déclarant en douane (transitaire). Je suis en France depuis 2010 et j'habite un foyer ADOMA en Alsace. En 1961, j'avais 5 ans, ma famille s'est exilée au Congo démocratique suite à la guerre coloniale. C'est là-bas que j'ai 'rencontré' l'Espéranto en 1991, en lisant *Une humanité et une langue*. J'étais touché, le livre ne parlait pas seulement de la langue mais aussi de la répartition de la richesse dans le monde entre tous les habitants de la planète. La Terre, la Vie est un don que Dieu a donné à tous. Ce n'est pas pour qu'une minorité se l'accapare.

Langue internationale

L'Espéranto est une langue internationale qui n'a pas de nationalité, elle est donc neutre. C'est la langue de la Paix, elle renforce l'amitié entre les peuples de différentes langues et cultures. Elle existe depuis 1887.

Depuis que je suis ici, je voyage beaucoup dans le cadre du congrès Espérantiste. Je suis allé en Allemagne, en Suisse, en Italie, j'ai parcouru la France. Dans nos congrès, une vingtaine de nations sont présentes et on ne parle qu'une seule langue :



l'Espéranto. Nous pouvons communiquer sans interprète, ni traducteur. Pour moi cette langue, c'est la langue de la Fraternité.

La faire connaître

Après ma rencontre avec un journaliste 'culture' des *Dernières Nouvelles d'Alsace*, ignorant l'existence de l'Espéranto, j'ai décidé d'organiser un festival de la langue « Afro-Als-Espérantophone » où on parlerait des langues Africaines, de l'Alsacien et de l'Espéranto, pour les faire connaître.

En tant que chrétien catholique, j'ai présenté d'abord ce projet au curé de la paroisse, Jean-Claude. Puis j'ai rencontré le maire du village d'Ingersheim qui est président d'une association de défense de la langue Alsacienne. Caritas et la paroisse nous ont soutenus par

Cette langue renforce l'amitié entre les peuples

la location d'une salle et pour divers frais. Les associations Espérantistes d'Alsace ont contribué en faisant venir les orateurs de Belgique. Nous étions environ 80 personnes présentes. Les espérantistes des 2 pays limitrophes, l'Allemagne et la Suisse, ont participé. C'est rare d'être aussi nombreux dans nos rencontres. De plus, le lendemain j'ai été invité à participer à une réunion de l'association mondiale des entrepreneurs du bâtiment espérantophones. Ils m'ont demandé de leur présenter un projet de construction d'une école professionnelle du bâtiment dans mon pays. Depuis, le projet a été présenté le 17 novembre 2013 au siège de l'association à Colmar. Beaucoup ne croyaient pas à cette utopie-là, c'est la majeure difficulté que nous ayons rencontrée. En 2014, la deuxième édition aura comme thème : la discrimination linguistique.

En Genèse 11, 6 il est écrit « *Eh, dit le Seigneur, ils ne sont tous qu'un peuple et qu'une langue et c'est là leur première œuvre ! Maintenant, rien de ce qu'ils projettent de faire ne leur sera inaccessible !* ». Alors, si le monde parle une seule langue, tout ce que nous projeterons (la paix, résoudre la faim...), nous serons capables de le faire. Le jour de la Pentecôte, les apôtres tous Galiléens, ont parlé et toutes les nations ont écouté. L'important pour Dieu c'est que son message soit compris de tous, non gêné par des barrières linguistiques. ●

Fernando Kinkani N'Kanú, avec la participation de Pascal Eigenmann

■ **Contact :**
Courriel : angolafemando@yahoo.fr

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2014 ĝis 2016

La abon-periodo 2013 jam finiĝis per la lasta numero 164. Ĉi-tiu numero 165 jam estas la unua de la jaro 2014. Ĝi estas la lasta sendita al ĉiuj malnovaj abonintoj. La venontan numeron 166 ricevos nur la abonantoj de la jaro 2014.

La adres-etikedo de via Informilo informas vin pri viaj pagoj. La unua linio antaŭ la adreso konsistas el la adreso-kodo, la abon-jaro, pago (A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE UEA ktp.) kaj eventualo pago por la sekvantaj jaroj 2015 - 2016

Se post via adreso troviĝas la mesaĝo "Fino de abono!!", tio signifas, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon al La Informilo por la jaro 2014. Tiam bonvolu ĝin senprokraste pagi laŭ la ĉi-suba tarifo.

Sam-okaze eblas pagi vian UEA-kotizon laŭ la ĉi-suba tarifo al nia kasisto, kiu senprokraste ĝin perados al UEA.

Nove:

Ekde ĉi-tiu numero ni proponas al vi aboni retan version de nia bulteno, ĝi estas duonkosta kompare kun papera versio. Tiam bonvolu indiki la ret-adreson al kiu ĝi estu sendata.

Se vi jam pagis vian abonon je 15 eŭroj kaj deziras tion ŝanĝi al reta abono, tiam bonvolu sendi vian peton rete al andreo.ag08@free.fr menciante vian ret-adreson, vian adres-kodon aŭ vian poŝtan adreson. Tiam via abono je 15 eŭroj estos kalkulita por 2 jaroj.

		Jaroj:	2014	2015	2016
		Abono por adresoj en Francio:	15 eŭroj	15 eŭroj	15 eŭroj
		Abono por adresoj ekster Francio:	18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
		Abono al reta versio	7,50 eŭroj	7,50 eŭroj	7,50 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj por UFE membro:	16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
UEA	MG	• Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado.			11 eŭroj
	MJ(-T)	• Individua Membro kun Jarlibro (kaj inkluzive ĝis 29 jaroj, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago).			26 eŭroj
	MA(-T)	• Individua Membro-abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo <i>Espéranto</i>			63 eŭroj
Pagmanieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2014 por 1208				
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2014, 2015 ktp. Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.				
	3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)				
	4. Per internacia ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)				

Lingvoilo Esperanto-korektilo en la reto

Stila kaj gramatika kontrolilo

Lingvoilo estas libera plurlingva programo por kontroli stilon kaj gramatikon en Esperanto, sed ankaŭ en multaj aliaj lingvoj. Lingvoilo atentigas pri tiuj eraroj, kiujn literuma kontrolilo ne trovas.

Lingvoilo povas ankaŭ atentigi pri literumaj eraroj, sed la versio por Libreoffice/OpenOffice nur atentigas pri gramatikaj eraroj. Uzu Esperantan vortaron kune kun Lingvoilo por literumaj eraroj en Libreoffice/OpenOffice.

Por iuj eraroj, Lingvoilo sugestas korektojn, kaj fojfoje havas ligilon al retaj gramatikoj (PMEG de B. Wennergren, La tuta Esperanto de H. Seppik, aŭ Lernu!) aŭ al la Reta Vortaro por pliaj detalaj klarigoj pri la eraro.

Provu Lingvoilo-n rete sen instali ĝin

Provu Lingvoilo-n rete sen instali ĝin

Algui vian kontrolendan tekston ĉi tie... Aŭ nur kontrolu tiun ekzemplon. Ĉu vi vi rimarkis, ke estas gramatikaj eraro en tiu frazo? Rimarku, ke Lingvoilo ankaŭ atentigas pri literumaj eraroj kiel ĉi-tiu.

En tiu teksto la eraroj estas substrekitaj

Esperanto ▾

Kontroli

Jen la rekomendoj de Bernard:

Unue, skribu vian tekston.

Due, iru al tiu retejo :

<http://www.language-tool.org/eo/>

Trie, kopiu la tekston, kiun vi skribis.

Kvare, gluu ĝin anstataŭigante tiun ĉi-supran frazon en la griza zono :

Kvine, Alklaku **Kontroli**

Sese, tiam aperas per diversaj signoj la trovitaj eraroj. Kompreneble personaj nomoj estas plej ofte nekonataj kaj menciitaj kvazaŭ eraroj.

Konkludo de Bernard

Se vi ne faras erarojn, vi ne bezonas tiun ilon. Mi ŝatas ĝin, ĉar ĝi permesas al mi ofte forviŝi la erarojn, kiujn mi ne vidis, ĉefe pro manko de atento kaj/aŭ malbona relegado.

En la korektilo, vi povas klaki sur la substrekitaj vortoj kaj vi ricevas klarigojn kaj kelkfoje proponojn de korekto. Do provu kaj malkovru.

Jen aliaj retejoj utilaj por Esperanto:

<http://vortaro.net/>

<http://www.reta-vortaro.de/revo/>

<http://apertium.saluton.dk/>

<http://translate.google.fr/?hl=fr&tab=wT#fr/eo/>

La 16-an de februaro forpasis Roland GENOT

Roland GENOT naskiĝis en 1937 kaj profesie laboris ĉe C.P.A.M., la ŝtata socia asekuro.

Esperanton li eklernis antaŭ kvindekda jaroj kune kun Arlette, lia edzino en kurso gvidata de Jean-Paul Colnot. Li multe reaktivis, kiam li proksimiĝis al la emeritiĝo uzante Esperanton interalie por korespondi kaj vojaĝi kun Arlette per motorbiciklo (alia hobia). En la grupo de Nancio, li alportis sian bonhumoron kaj agemecon (li eĉ kreis esperantlingvan "scrabble"-ludon). Li multe klopodis por konatigi Esperanton per publikaj prezentadoj kaj prizorgoj de informbudoj.

En Champenoux li sukcesis akceptigi, ke la urbaj konsilantoj donu al voĵeto la nomon "Zamenhof" (unikaĵo en nia departemento).

Gravan rolon li ludis kiel membro de Pasporta Servo. Esperantistoj el pli ol dek diversaj landoj estis gastoj de Arlette kaj Roland !

Bedaŭrinde antaŭ deko da jaroj, sangmalsano ekatakis lin kaj li ne plu povis uzi sian motorbiciklon por veni al la semajnaj kunvenoj de la nancia grupo. Ni vidis lin malpli ofte, sed li tamen povis daŭre vojaĝi kaj akcepti vizitantojn.

Tamen, dum la lastaj monatoj, lia sanstato malbone evoluis kaj li devis restadi en hospitalo ĝis sia forpaso la 16an de februaro 2013.

Ni konservu de li bildon de agrabla kaj vigla homo !

Tous les chemins mènent à l'espéranto



Eléna Véliscu et Roland Génot au pied de la plaque du Docteur-Zamenhof.

Skribas samideanoj el eksterlando

Kara Jean-Luc kaj ceteraj samideanoj, precipe de Nancio,

Dankon pro la funebra sciigo. Roland Genot estis mia gastiganto dum kelkaj tagoj en februaro 2010, kiam mi unuafoje vizitis Nancion, ankoraŭ vizitante ĝin el Metz kun mia tiama koramikino Salomé. Duonjaron poste mi venis por loĝi en Nancio dum ok monatoj. Dum iu el la postaj revenoj mi foje petis denovan gastigon ĉe li, sed tiam lia sano jam ne plu povis permesi tion.

Mi memoras, ke li rakontis al mi pri sia motorciklo kaj kiel li kaj lia edzino foje vojaĝis per ĝi ĝis Esperanto-kongreso en Beogrado. Li ankaŭ montris al mi la Zamenhof-vojon en Champenoux, kiun li iniciatis, kaj la superbazon por ĝardenistoj. Tie ni faris foton, kiun mi nun portempe alŝutis por tiuj, kiuj volas rememori lin laŭ aspekto:

<http://is.muni.cz/de/172464/P1080029.JPG>

Pro malbela vetero li ne sukcesis jam gvidi min al apuda lago, sed esprimis esperon eble fari tion "la venontan vojaĝon".



En mian memorlibron li la 17-an de februaro 2010 skribis: "Ni ŝatas akcepti esperantistojn ĉar por ni ĉiuj fojoj estas vojaĝo sen eliri el nia domo. "

Omaĝe al Roland Genot, mi hodiaŭ verkis artikolon pri lia komunumo en Vikipedio:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Champenoux> Unu el la fotoj mi aldonis ankaŭ al la listo de ZEOj en Francio, kie jam ĉeestis mencio pri la Zamenhof-vojo:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Listo_de_Zamenhof/Esperanto-objektoj_en_Francio#C

Ĉiu estas bonvena redakti la menciitajn artikolojn kaj korekti aŭ aldoni tion, kion mi ne scias.

Se iu el la esperantistoj partoprenos la funebran ceremonion, bonvolu transdoni mian kondolencon al la edzino. Ni ne konis nin multe, sed li foje multe helpis al mi.

Kun salutoj el Brno en Ĉeĥio, via eks-klubano Marek Blahuš

Estimataj francaj gesamideanoj,

Ĝus kun granda ĉagreno ni legis en la revuo "Esperanto" la dolorigan mesaĝon pri la forpaso de s-ano Pol Denis, via/ nia kara amiko, elstara esperantisto, talenta redaktoro kaj senlaca prizorganto de "La Informilo", bonkora, humurplena, muzikema, helpopreta kaj ege agrabla homo, kies multjaran amikecon, sincerajn ridetojn, neelĉerpeblan bonhumoron kaj vivooptimismon ni neniam forgesos.

Pol dufoje vizitis nin en Samarkando kaj komuniĝo kun li ĉiam estis granda plezuro kaj vivo-inspiro.

Ni esprimas al vi, al la familianoj de Pol kaj al ĉiuj legantoj de "La Informilo" niajn profundajn kaj elkorajn kondolencojn.

Pol ĉiame vivos en nia memoro.

Li dormu pace. . .

Funebre kaj kondolence, Anatoli Ionesov Samarkando, Uzbekio



Ginette Martin rakontas al ni pri sia aventura vojaĝo al la staĝo en Speyer kaj ties restado la 18-20ajn de oktobro 2013

Komence la sorto estis malfavora al mi, mi ricevis mian kutiman porcion da emocioj. Mi devis renkonti Simone Cajelot en Saint-Dié por plua komuna vojaĝo al Strasburgo.

Mi planis uzi sinsekve buson, trajnon, trajnon, kaj trajnon. La problemo estis la trajno No2, kiu estas tre malnova trajno, kaj veturas sur malnova trako kaj ne malofte paneas. Mi ne estis certa, ke mi povos kapti la trajnon por Strasburgo kaj mi timis ke Simone foriros sen mi.

Miaj timoj konkretiĝis. Mi estis en Arches, estis la 7a20 kaj oni anoncis, ke la trajno venos kun 20 minutoj da malfruo. La tempo inter la du trajnoj en St Dié konsistis en nur 11 minutoj. Tiu malfruo estis katastrofa!

Ĉu mi ŝanĝu mian planon kaj decidu iri tra Nancio anstataŭ Strasburgo (trajno je la 8a45)? Aŭ kiam mi fine atingos St Dié, ĉu mi atendu alian trajnon por Strasburgo (fakte buson je la 14a01)? Mi devis decidi rapide kion fari.

Feliĉe, la deĵoranto de la staci-domo estis tre afabla. Mi demandis: Ĉu la trajno al Strasburgo atendas la malfruantan trajnon en St-Dié? (Mi tre timis nean respondon, ĉar mi estis la sola vojaĝanto, kiu celis Strasburgon). "Mi ne scias, sed mi telefonos".

Post momento, mi havis la respondon: "La trajno al Strasburgo atendas vin".

Mi sentis malpezon. Mi nun estis en la trajno, kiu malfruis je 20 minutoj kaj mi admiris, kiel la deĵorantino en la trajno elturniĝis. Ŝi unue enketis, kiuj vojaĝantoj devos eliri antaŭ St Dié, kaj poste ŝi telefonis de stacidomo al stacidomo, por scii, ĉu oni devas haltigi la trajnon por preni iun. Tiamaniere la trajno haltas nur kiam necesas, kaj ĝi sukcesas regajni 10 minutojn. Mirakle akurata!

En St Dié mi havis tempon nur por salti de unu trajno al la alia. Fine mi renkontis Simone-n kaj nun la bonŝanco estis kun mi.

Tiu emociiga problemo donis al mi la oportunon konstati la bonvolon, bonhumoron kaj helpemon de ĉiuj en la trajno. Kiam okazas problemo, la kunvojaĝantoj kaj la

deĵorantoj helpas. Tio kompensas la pli kaj pli oftajn misojn ĉe la inter-vilaĝaj trajnoj.

La sekvo disvolviĝis glate; en Strasburgo ni tramis ĝis la apartamento de Bernardo, kaj post la manĝo, ni veturis kune ĝis Speyer.

Tie ni alvenis je la ĝusta momento, kiam Inge komencis la ekskurson al la akvarioj de la urbo, kaj tio komenciĝis per tre agrabla piedpromenado laŭlonge de la Rejno. La vetero estis agrabla kaj suna. Ĉe la akvarioj, ni vidis interesajn fiŝojn: la plej nekutimaj por mi estis ŝarkoj, kiuj naĝis super niaj kapoj, krokodilo, kaj ovoj de ŝarkoj.

Mi ne sciis, ke ovoj de iuj ŝarkoj povos resti 7 monatojn inter la marherboj sur la rokoj antaŭ ol eloviĝos la naskiĝpretaj ŝarkidoj.

Sed la virino, kiu klarigis tion kaj volis surprizi nin, subite ricevis sian propran surprizon: ni estas internacia grupo de esperantoparolantoj! Ho! Informo pli interesa ol la ovoj de ŝarkoj!

Post la reveno de "mara vivo", ni konatiĝas kun la novaj alvenintoj, kun la salonoj, ĉambroj, kaj venis la momento de la vespermanĝo. Oni rajtis preni libere kaj ĝissate el tre diversaj pladoj. Tio estis abunda kaj

bongusta!

Post la vespermanĝo, diversaj grupoj estiĝis laŭ la nivelo. Grupo rigardis fotojn de Rejkjavik kaj de Aalen. Poste ni ludis du ludojn: unue interkonatiĝan ludon, en kiu ni devis prezenti nin kaj niajn hobiajn per gestoj, kaj ĉiuj devis memori kaj rediri la jam dirtajn frazojn. La alia ludo laborigis kaj cerbojn kaj korpo-reagojn, ekzemple "tiu, kiuj havas katon, (aŭ ŝatas kuiru, ktp. .). ŝanĝu sidlokon".

Poste ni havis interesan projekcion de video-filmoj, kiuj partoprenis en la konkurso de video-filmoj reklamantaj por Eo. Pluraj estis tre bonkvalitaj (videblaj sur Youtube en la rubriko "filmkonkurso")



Sabate matene, Ramon Perera vekis nian intereson pri Katalunio (manifestacioj por sendependeco, historio, ktp. . .) kaj poste Jean-Luc prezentis la novajn librojn de la libro-servo.

Posttagmeze mi elektis iri sur la ŝipon. Pro bela suno, ni sidis sur la ferdeko de la boato. Ĉu krosado sur la rivero? Ho! Ĉefe temis pri surŝipa flosanta kafejo. La homoj ne havas la seĝojn kun la rigardo antaŭen, sed sidas ĉe tabloj po 6 personoj. La homoj ĉefe babilas, manĝas glaciaĵojn kaj trinkas bieron. La pejzaĝo estis riĝoziga, sed ne komplete atento-kapta, ni do diskutis kun niaj najbaroj, ankaŭ iom propagandis por esperanto.

Poste ni retrovis grupon, kiu intertempe vizitis la urbon kune kun ĵurnalisto. Ni kuniĝis por la vizito al la impona belega katedralo. Okazis ekumena di-servo (ne long-daŭra, agrabligita per muziko de orgeneto kaj fluto).

Poste sekvis tre ampleksa detala vizito de ĉiuj partoj de la katedralo, inkluzive la malsupran parton.

Post la vespermanĝo, grupeto, en kiu mi estis, havis rol-ludon kun Alois Eder. Kiel vi voĉ-donos ĉe futuraj eŭropaj balotoj: Verduloj, EDE (Eŭropo Demokratio Esperanto) aŭ Unu Mondo? Unu kandidato por ĉiu partio argumentis antaŭ la publiko, kiu partoprenis en la diskutoj. Poste ni simulis voĉdonadon, ĉiu en la publiko iris apud la kandidaton de la elektita movado. La rezulto iĝis: unue la Verduloj, due EDE, trie UNU MONDO.

Venis tiam novaj argumentoj: "Al verduloj ne mankos voĉoj, nek al EDE (en Germanujo, ili bezonas entute 4000 subskribojn), ĉu vi ne ŝatus subteni la plej endanĝerigatan partion? Nun voĉdonu inter EDE kaj Unu Mondo". Surprize nun, pli da homoj iris al Unu Mondo.

Poste Alois montris, kiel oni povas nutri la retejon Tatoeba per tradukoj de frazoj en esperanton. Alois montris kelkajn konkretajn ekzemplojn por enretigo de frazoj. Li ankaŭ montris ke, en tiu ĉi retejo, esperanto pli kaj pli alproksimiĝas al la rango de la angla.

Demando de aŭskultanto: Ĉu ĝi ne estas nur konkurso inter la diversaj kontribuantoj por gajni poentojn? Ĉu simplaj homoj vere

konsultas tiun ĉi retejon? Alois respondis: Ŝajnas, ke plej ofte la spertuloj pri lingvoj rigardas ĝin, kvankam oni povas lerni aŭ plispertiĝi en ne-konata lingvo per tiu metodo.

Dimanĉe matene, Horst Vogt rakontis pri la studoj en Poznan, en kiuj li ĉeestis, pri la etoso, pri la enhavo de la studoj, pri la intereso de scienca uzo de esperanto, kaj pri la deko de valoraj instruistoj (unu el ili eĉ parolas la latinan hejme). Li montris al ni sian ampleksan diplomlaboraĵon.


Poste venis Julia Noé, kiu prezentis, en formo de detektiv-romano, la problemojn kiujn ŝi spertis kun fiuloj, kiuj uzurpis ŝian ret-adreson kaj kodon por sendi diversajn pakaĵojn en diversajn lokojn de Germanujo. Ŝi devis peti la helpon de policistoj por serĉi la kulpulojn.

Bedaŭrinde, nenio sukcesis ĝis nun. Ŝi klare kaj verve rakontis tion.

Kaj nun jen mi troviĝis en la trajno tuj post la tagmanĝo kun 3 junuloj: Annika, Jarno kaj Klemens. Tio respegulas la ĉefan econ de tiu ĉi seminario: ĝi estis juneca. Inter la 40 partoprenantoj, ni havis 2 bebojn kaj eĉ unu knabeton preskaŭ bebo. Tio signifas, ke ĉeestis junaj paroj. Tre dinamikan etoson ni spertis kun 2 sunaj tagoj el tri.

Ginette





Ĉu ...?

Trapasu la KER-ekzamenojn de UEA-ITK

Ĉu ankaŭ vi deziras pruvi per oficiala ŝtata diplomo vian lingvoscion pri Esperanto ?

Ĉu vi scias ke en Hungario jare plurmil homoj ekzameniĝas pri Esperanto kaj uzas la akiritan atestilon por havi avantaĝojn en siaj studoj kaj laboro?

Ĉu entute vi scias kiunivele vi konas nian lingvon ?

UEA kunlabore kun la hungara ekzamencentro, aneksita al la prestiĝa budapeŝta Universitato Eötvös Loránd funkciigas novan ekzaminsistemon, laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) de la Konsilio de Eŭropo.

Institucio

La novaj ekzamenoj nun estas ellaboritaj en **nivele B1 (komencintoj), B2 (mezniveluloj) kaj C1 (progresantoj)**. Mem la atestilo estas impona, oficiala dokumento, verkita en 4 lingvoj (en Esperanto, angla, germana kaj franca).

La akreditigo kaj funkciigo de la sistemo okazas kunlabore kun la Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK) en Budapeŝto, kie Esperanto troviĝas inter la oficiale rekonataj fremdaj lingvoj.

Nia hungara partnero ITK estas plenrajta membro de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo [ALTE](http://www.alte.eu).

Prezoj

Bazaj prezoj:

68 (B1)-74 (B2)-84 (C1) eŭroj

Por landoj: Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Britio, Danio, Finnlando, Francio, Germanio, Greklando, Hispanio, Irlando, Islando, Italio, Japanio, Kanado, Luksemburgio, Nederlando, Norvegio, Nov-Zelando, Svedio, vislando kaj Usono.

A-landoj: 44(B1)-48(B2)-54(C1) eŭroj

Ĉeĥio, Estonio, Honkongo, Hungario, Israelo, Kipro, Korea Respubliko, Latvio, Litovio, Malto, Pollando, Portugalio, Singapuro, Slovakio, Slovenio, Sud-Afriko kaj Tajvano

B-landoj:

34(B1)-38(B2)-42(C1) eŭroj

Argentino, Brazilo, Ĉinio, Rusio kaj ĉiuj supre ne listigitaj landoj.



Informoj

Detalajn informojn vi povas elŝuti en la paĝaro <http://edukado.net/ekzamenoj/ker>

En la sekcio [PRISKRIBOJ](#) vi povas legi la detalan prezenton pri la postuloj kaj strukturo de la ekzameno.

Vi certe rimarkos, ke kompare kun la malnova ILEI-UEA-ekzamenoj en la KER-ekzameno nur en la parola parto estas kelkaj demandoj traktantaj la movadajn kaj kulturajn konojn pri Esperanto, la skriba parto ne entenas tiajn taskojn.

Por interesuloj ni aparte konsilas mendi ĉe UEA la eldonaĵon [Esperanto de nivelo al nivelo](#), kiu entenas ĉiujn necesajn informojn kaj seriojn de specimenoj je ĉiu nivelo de la ekzaminsistemo.

Sesioj

Por la sekva periodo ni jam planis kelkajn sesiojn.

2014

- 25 januaro : Antverpeno (Belgio)
- 24-28 januaro: Florianopolo (Brazilo)
- 2-4 majo: Ronda (Hispanio) – Greziljono (Francio)
- 17 majo : Tutmonda Ekzameno
- 6-9 junio: Erfurt (Germanio)
- 1 aŭgusto : Bonaero, Argentino, UK

Aliĝilo al la sesioj :

<http://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>

Organizantoj de grandaj eventoj kaj renkontiĝoj, interesataj kunokazigi sesiojn, kontaktu [Katalin Kováts](mailto:katalin.kovats@edukado.net).

Intervjuo pri la KER-ekzamenoj



Inter 2009 kaj komenco de 2014 jam **1346 esperantistoj el pli ol 60 landoj** trapasis la ekzamenon .

Se ankaŭ vi volas trapasi la novajn KER-ekzamenojn, petu informojn pri la sekvaj sesioj ĉe [UEA](#) aŭ rekte de Katalin Kováts, je la adreso ker-ekzamenoj@edukado.net

Découverte du TADJIKISTAN grâce à Svetlana et Firdaŭs SHUKUROV



Invités de Espéranto-Thionville et de l'association locale "Forum des citoyens", Svetlana et Firdaŭs SHUKUROV, citoyens tadjiks, retraités de l'enseignement, ont présenté, lundi 10 mars 2014, au café "Le Gueulard" un exposé plein d'intérêt sur ce pays lointain.

Firdaŭs a également répondu avec plaisir aux questions du public.

Pour finir, nos deux conférenciers ont revêtu le costume folklorique de leur pays rehaussé d'ornements aux couleurs éclatantes.

Les applaudissements nourris ont terminé cette agréable soirée.

Roger CONDON

Iam, vi trovis interesan objekton en rubujo, rakontu:

Iam, mia edzo kaj mi iris en la rubujo porti dikajn objektojn. Ni rimarkis belan tableton, sed du piedoj estis difektitaj. Ni portis la tablon en la domon. Ni tranĉis duone la kvar piedojn.

Hodiaŭ beleta tablo malalta troviĝas apud la brakseĝo.

Claudine


Antaŭlonge, kiam miaj infanoj estis ankoraŭ junaj, iam mi pasis antaŭ rubujo. Ni vidis trotilon. Vere tiu ludilo estis malbon-stata : malpura, rusta, kun la du radoj eluzitaj.

Tamen, ni alportis ĝin ĉe ni. Mia edzo estis brikolisto. Li trovis aliajn radojn, purigis kaj refarbis la ludilon. Poste, li alligis sonorilon sur la stirilo. Jen ! Niaj filinetoj multfoje gaje trotis kun tiu ludilo.

Denise

Post la sukcesa krimromano de la germana aŭtoro **Thorsten SUEÛE Toter Lehrer – Guter Lehrer** (Morta instruisto – Bona instruisto) aperis en februaro 2014 en la eldonejo CW Niemeyer Verlag dua verko de la sama aŭtoro, kies temo denove roligas Esperanton : **Die Tote und der Psychiater** (La mortintino kaj la psikiatro) Pliaj informoj en [Flyer zum Buch](#), ĉe [Amazon](#) sur la retejo de la aŭtoro ([Web-Seiten des Autors](#))

La 15-an de marto la aŭtoro prezentis sian libron mem ĉe la Librofoiro de Leipzig.



Thorsten SUEÛE

Die Tote und der Psychiater

1. Teilroman, 2014, 160 Seiten

Kriminalroman

ISBN 978-3-943987-10-0

ISBN 978-3-943987-11-7

1,99 Euro

Thorsten SUEÛE ist ein deutscher Schriftsteller und Journalist. Er ist der Autor von mehr als 20 Romanen und hat für verschiedene Zeitschriften geschrieben. Sein Buch 'Die Tote und der Psychiater' ist sein erstes Kriminalroman. Das Buch ist ein Teilroman und besteht aus zwei Teilen. Der erste Teil handelt von der Ermordung einer Frau in einem Krankenhaus. Der zweite Teil handelt von der Ermittlung des Täters. Das Buch ist ein spannendes und interessantes Lektüre.

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

De la 8a ĝis la 15a de marto 2014 en Les Issambres - Restadejo Val d'esquière

Ĉe la Mediteraneo jam printempas komence de marto, tie floras mimozoj kaj migdal-arboj. Ĉi-jare tiu Esperanto-semajno okazis en taŭga hotelo en Les Issambres je 30 km de Saint-Raphael kun preskaŭ 100 partoprenantoj. Estis proponitaj 3 kursoj, por komencantoj, kiun gvidis Christine Graissaguel, por parolantoj, gvidata de Barbara PIERTZAK, el Pola Radio. La prelegon pri la historio de ciferoj, kalendaroj, skrib-sistemo prizorgis Romano BOLOGNESI kun vigla partoprenado de la ĉeestantoj.



Pluraj partoprenantoj ĝuis la prelego-serion de Romano BOLOGNESI pri malnovaj ciferoj, kalendaroj, skriboj. Krome la celo estis ankaŭ paroligi la partoprenantojn per diskutoj.



La kurso por komencantoj gvidata de Christine Graissaguel.

En la posttagmezoj estis proponitaj ekskursoj al Fréjus kaj al les Arcs sur Argens. Plej interesa ekskurso okazis per aŭtobuso al mediteranea ĝardeno. Tie oni klopodas kompreni kaj respekti la naturon, lasi ĝin tute libere kreski, eble iomete malfavore al la estetiko. Velkantaj folioj estas ofte protekto por la arboj.



La mimozoj bele kreskas en ĝardenoj proksime de la hotelo.



En la paroliga kurso estis ĉirkaŭ 30 lernantoj, kiuj diligente sekvis la kurson de Barbara PIERTZAK

Restaĵo de malnova akvo-dukto en Fréjus



Mediterranea ĝardeno borde de la maro

Jen ege agrabla semajno en komforta hotelo, bongustaj manĝoj, ĉirkaŭata de riĉa naturo ĉe lazura marbordo. Tie eblas kune ĝui amikan etoson en Esperanto-medio. Eble venontjare ankaŭ vi ĝin partoprenos.

Fotoj kaj teksto Andreo

El nia fototeko



Karnavalantoj en Hispanio trovis la verdan stelon

Surprize dum prezento de hispania karnavala bando aperis verdaj steloj, aludoj al Esperanto, kaj eĉ frazoj en Esperanto. Nur post la prezento hispanaj esperantistoj eksciis pri la afero. La aŭtoro de la spektaklo, José Manuel Marín, ekhavis la ideon dum leciono pri signolingvo.



Partoprenantoj al la Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres en marto 2014